

La aktuala intervjuo

Rudolf Fischer prezidanto de GEA

E.a.: S-ro Fischer, ĵus la membrokunveno dum la Germana Esperanto-Kongreso elektis vin prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA). Ĉu oni rajtas gratuli?

R.F.: Mi pli volonte akceptas bondezirojn por nia laboro. Tre ĝojigis min la fido de la membraro al mi, kiun mi ofte dum la kongreso sentis. Eĉ malgrandajn paneojn oni ne tiom senindulge kritikis kiel kutime.

E.a.: Ĉu el via vidpunkto la kongreso estis sukcesa?

R.F.: Absolute jes. La programo estis bona miksaĵo inter distraĵoj kaj laborokunsidoj. La lastaj laŭ mia impresoj estis pli viglaj ol dum la antaŭaj jaroj. Iom mi bedaŭris tamen, ke relative multaj GEA-estraranoj pro diversaj kaŭzoj ne ĉeestis la kongreson. Tio laŭeble ne ripetigu.

E.a.: Kaj ĉu nun komenciĝas sub via gvidado nova erao de GEA?

R.F.: Ne en tiu senco, ke mi nun povas ĉion ŝanĝi. Ke mia antaŭulo, Andreas Emmerich, restas vicprezidanto, montras, ke temas pri kontinuo de la ĝisnuna laboro, eble kun iom ŝovataj akcentoj.

E.a.: En *Esperanto aktuell* antaŭ ne longe estis la demando, ĉu Esperanto estas nun antaŭ sia fino. Kiel vi vidas tion?

R.F.: Mi tre miris pri tiu rezonado, kiu tre unuflanke interpretas nekonstesteban fenomenon, nome, ke niaj grupoj ŝrumpas. Sed unue tio estas nuntempe ĝenerala fenomeno, kaj due tio nur signifas, ke ni devas novorganizi nian laboron. La kunvenoj de la grupoj, iam la nura eblo, praktikis nian lingvon kaj plistabiligi niajn internajn kontaktojn, ne estas plu tiom bezonataj, ĉar ni ĉiutage renkontas Esperantistojn el la tuta mondo en la Interreto.

E.a.: Sed kion faru tiuj, kiuj ne havas retkonekton? Kaj ĉu ne la buŝa apliko de Esperanto reduktiĝos zorgige?

R.F.: Restas la aranĝoj, al kiuj oni povas veturi, kaj nia kalendaro estas plena kiel neniam ajn antaŭe. Aliflanke, pro niaj membroj sen komputilo ni ankaŭ ne planas, eldoni *Esperanto aktuell* nur en elektronika formo.

E.a.: Ĉu vi povas diri ion pri la novaj akcentoj de la estrara laboro, kiun vi jam menciis?

R.F.: Jes, volonte. Post la establado de nia centro en Herzberg ni havas la eblon, kunlabori kun Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) trejni estontajn instruistojn kaj kursestrojn. En tiu agado ankaŭ Germana Esperanto-Instituto (GEI) ludu pli grandan rolon ol ĝis nun. La centran celon mi formulus tiel, ke ni dum la venontaj jaroj volas plifortigi niajn klopodojn, esti videblaj. Ankaŭ ĝis nun ni ne restis en memelektita geto, sed ofte aperis en aranĝoj de aliaj asocioj, ekzemple komence de junio en la evangelia eklezia kongreso en Kolonjo kaj meze de junio en la lingvofoiro de „Verein Deutsche Sprache“ en Mühlhausen, Turingujo. Tasko de AGEI estos, instigi lernejojn al projekt-semajnoj kun Esperanto kaj eble eĉ stimuli tiun aŭ alian instruiston, gvidi laborgrupon de Esperanto aŭ prezenti Esperanto-provlecion anstataŭante kolegon en instruaro. La lerneja instruado en Herzberg mem estas ja jam kuraĝiga.

GEI havas sur la tablo, elverki ekzamenojn, kiuj laŭ la nivelo estos kompareblaj kaj agnoskataj same kiel aliaj fremdlingvaj ekzamenoj en Eŭropo. Tio estus tre grava paŝo antaŭen, kaj miajn bondezirojn al prof. d-ro Martin Haase, direktoro de GEI, atingi tion. Plifortigi la pozicion de la subfako interlingviko en la universitatoj, ni povas grandparte cedi al la koncerna scienca



Rudolf Fischer
Foto: Michael Schwakenberg

societo, „Gesellschaft für Interlinguistik“, kiu ja ne estas kaj ne estu Esperanto-entrepreno. Tamen ankaŭ la Esperanto-instruado bone konformas kun tiu kadro.

E.a.: Ĉu el via vidpunkto estas iu bona perspektivo de Esperanto nuntempe?

R.F.: Jes. Ŝajnas, ke la publika opinio pri Esperanto ŝanĝiĝas al rimarkeble pozitiva sinteno. La juna generacio ne plu havas antaŭjuĝojn. Plie ofte petas nin eksteruloj, aldoni Esperanton al la lingvoj de iuj aktivadoj, retpaĝoj aŭ informportaloj, ĉar „Esperanto tie ja ne manku“. Nia lingvo estas survoje al stato, ke ĝi ne plu estas ekzotikaĵo, per kiu oni povas amuzi eksterulojn, sed ĝi komencas aparteni al la socia ĉiutago. Danke al niaj retkursoj ankaŭ ne-movadanoj lernas kaj aplikas Esperanton. La plej freŝa kulmino estas la invito de Europa Union, ke mi dum publika diskuto en Berlin prezentu niajn ideojn, kiel Esperanto povas utili al la EU. Malgraŭ ĉiuj skrupuloj, ke nek ni nek Esperanto estas jam maturaj por grandvaste enkonduki ĝin, ni almenaŭ devas skizi viziojn. Nome, la nuran alternativon, ke Eŭropo transprenu la Usonan kaj forjetu siajn gepatrajn lingvojn, apenaŭ iu volas.

E.a.: S-ro Fischer, dankon pro la intervjuo kaj bondezirojn por via laboro!



La 6A-klaso antaŭ la Esperanto-Muzeo en Vieno.

Lingva projekto en gimnazio en Vieno

La 11-an de aprilo 2007 okazis lingva projekto en la viena gimnazio Diefenbachgasse 19. La 23 gelernantoj – ili estas 16-jaraj - referis tri horojn pri jenaj temoj: lingvoj en EU kaj en la mondo; la estiĝo de altlingvoj el dialektoj: germana, franca, itala; planlingvoj ĝenerale; la planlingvoj Volapük, Esperanto, Ido, Interlingua, Occidental, Edanisch; sciencaj fakesprimoj; tradukproblemoj kaj -kostoj en EU. Poste okazis vizito de la Internacia Esperanto-Muzeo kaj de la Globusa Muzeo en Vieno en Herrengasse 9.

Walter Klag

Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek

2007 feiert das Esperantomuseum – 1927 von Hugo Steiner als Verein „Internationales Esperantomuseum in Wien“ gegründet und 1929 der Österreichischen Nationalbibliothek angegliedert – sein 80-jähriges Bestehen. Gleichzeitig wird das 1887 vom polnischen Augenarzt Dr. L. L. Zamenhof in einer schmalen Broschüre vorgestellte Projekt Lingvo Internacia – später Esperanto genannt – heuer 120 Jahre alt.

Das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek ist das bedeutendste seiner Art weltweit. Es vermittelt einerseits über ein modernes Museumskonzept mit multimedialen Präsentationen, die mehr als hundertjährige wechselvolle Geschichte des Esperanto und thematisiert andererseits ganz allgemein das Verhältnis des

Menschen zur Sprache. An interaktiven Medienstationen können sich die BesucherInnen in andere Plansprachen vertiefen, wie die mystische Sprache Lingua Ignota der Hildegard von Bingen oder das Klingonische aus der Fernseh-



serie Star Trek, wobei diese Sprachen auch akustisch vermittelt werden. Eine Medienstation ist dem Deutschen und dem Englischen als künstliche Sprachen gewidmet und bezieht sich auf eine wenig bekannte Tatsache: So sind z.B. eine Reihe von Wörtern unserer Sprache – wie Gas oder Kino – künstlichen Ursprungs, da sie kein Produkt

natürlicher Entwicklung, sondern Schöpfungen von bestimmten Personen sind. Dass Vermittlung von Grammatik auch leicht und ohne Pauken vonstatten gehen kann, beweist ein Spielautomat, bei dem man sich anhand des nun schon legendären Pacman-Spiels die Grundlagen der Esperanto-Grammatik aneignen kann. Ein Video-Kurs der BBC vermittelt einen Eindruck, wie gesprochenes Esperanto klingt.

Die Sammlung für Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek ist die weltweit größte Fachbibliothek für Interlinguistik und dokumentiert an die 500 verschiedene Plansprachen – darunter Volapük, Ido, Interlingua und Esperanto – in 25.000 Bänden, 2.000 musealen Objekten, 2.000 Autographen und Handschriften, 13.000 Fotos und Fotonegativen, 1.100 Plakaten und 40.000 Flugschriften.

Esperantomuseum

Herrengasse 9, 1010 Wien

Offizielle rekonozition je alta nivelo

La oficiala rekonozition de Esperanto en Aŭstrio estas pro la laboro de la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por planlingvoj (Aŭstria Nacia Biblioteko) sur tre alta nivelo: Ree kaj ree Esperanto estas pri-traktita en oficialaj kadroj kiel serioza afero.

Herbert Mayer

Esperantomuzeo, Vieno

Bertha von Suttner subtenis Esperanton

En „Espero Katolika“ n-roj 5-12/2006, p. 76, aperis artikolo pri la unua roma esperantisto „naskita en Romo“ kun noto 1 el „Esperantisto“, januaro 1892. Temas pri la „Kongreso de la paco“ kiu okazis en Romo. Mi citas: „En tiu kongreso por paco, inaŭgurita sur la kapitola monteto novembre de 1891, partoprenis interalie la aŭstria baronino Bertha von Suttner (Prago, 9.6.1843 – Vieno, 21.6.1914 – kiu en 1905 ricevis la Nobelpremio por paco); dum la postaj jaroj ŝi pozitive parolis pri Esperanto.“ Do, denove fonto, ke Suttner subtenis Esperanton. *Leopold Patek*

La Zamenhof-strato de Roman Dobrzyński

La principo temas pri tre originala kaj aprobinda ideo kompili libron pri la historio de Esperanto surbaze de intervjuo kun la (remalkovrita) nepo de L.L. Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof (*1925). Finfine mi havis la okazon legi la libron de la konata pola esperantisto Roman Dobrzyński kaj prikomenti ĝin. Kiel svisio mi ĝojas, ke en pluraj okazoj Svislando estas menciita en pozitiva senco. Tamen ĉe mi aperis kelkaj demandosignoj ĉefe pri la aŭtentikeco de la intervjuo mem.

Emociigaj estas la respondoj de Zaleski al la demandoj faritaj al li en la unua ĉapitro titolita „La Muroj“, en kiu la nepo rakontas, laŭ siaj disponeblaj memoroj, pri la vivo en la varsovia getto dum la germana okupacia tempo en Pollando. Sensacie estas legi, kiel la 14-16-jara knabo moviĝis trans la muroj de la getto kiel muso aŭ serpento kaj povis savi sian propran vivon dank’ al la hazardo, kiel tio siatempe estis la kutimo, krome dank’ al la cirkonstanco, ke mankis al li la cirkumcido. Per siaj memoroj Zaleski, kiu iam nomiĝis kiel sia fama avo Ludwik Zamenhof, kontribuas al la priskribo de la situacio en la varsovia getto, pri kiu la monda publiko legis en la priholokaŭsta literaturo nacilingva (komparu ekzemple la memorojn de Marcel Reich-Ranicki aŭ de Ignaz Bubis). Plej impresa estas la konstato, aŭ konkludo, de Zaleski, ke li neniam povis liberiĝi de la konvinko, ke pro sia nomo pereis lia patro, Adam Zamenhof. En tio do kuŝas la ĉefa tragiko - kaj paradokso - de la nomo Zamenhof. Kiel sciante, la patro Adam estis mortpafita, kaj pluraj familianoj pereis en la nazia koncentrejo de Treblinka. Sendube oni dezirus ekscii pli multe el la persona memoro de Zaleski pri la getto, la zamenhofa familio kaj la Zamenhof-strato mem, sed evidente lia rakontkapacito estas limigita, ĉar kiel knabo en tiu aĝo oni povas kutime konservi nur fortajn impresojn kaj ĝeneralajn memorojn. Aliflanke oni povas kompreni kaj devas agnoski, ke

Zaleski, viktimo de la kontraŭjuda genocido, malvolonte refreŝigas plej dramajn epizodojn de sia vivo.

Post la milito ne Esperanto estiĝis la vivocelo de la nepo de L.L. Zamenhof, kiu devojiĝis de la familia tradicio kaj ne fariĝis kuracisto, sed konstruĝeniero kun doktora titolo. Kiel specialisto pri prembetono Zaleski kunlaboris en diversaj grandaj konstruprojektoj kaj havis tiel la okazon vojaĝi ĉirkaŭ la mondo. En la dua ĉapitro pri „La Insuloj“ Zaleski donas detalajn informojn pri siaj profesiaj aktivecoj. En la (Zamenhof-) jaro 1959 li elmigris de Pollando al Francio kaj tiel, ŝajnas al mi, li fremdiĝis rilate sian patrujon kaj dume ankaŭ distanciĝis de la Esperanto-movado. Evidente li ne tro ŝatis ludi la rolon de la nepo de Zamenhof, al kiu oni konstante fingromontris, en universalaj kongresoj aŭ aliokaze. La plezuro ludi la rolon de la LLZ-nepo reaperis ĉe Zaleski fakte nur post lia pensiigo. Sed intertempe trafluis 40 jaroj.



En sia postparolo Dobrzyński konfesas, ke li grandparte mem redaktis la tekston, do sekve ankaŭ helpis doni la respondojn de la intervjuito. La plej grandaj duboj pri la aŭtentikeco de la respondoj, kaj en tio konsistas mia ĉefa kritiko al la libro, aperas plej malfrue en la ĉapitroj „La turoj“ kaj „La vojoj“. Nome por kompetente respondi la demandojn pri esperantologio kaj interlingvistiko kaj por klarigi la historion de Pollando, kio estas la kazo en

la libro, oni devas esti bona konanto de tiuj temoj. Kredeble Zaleski ne estas fakulo pri tiuj temoj. Ni tamen kredu, ke interparoloj pri tiaj temoj pli malpli intense okazis inter la intervjuito kaj intervjuito. Laŭ la indikita bibliografio la respondoj evidente estis prilaboritaj surbaze de la esperantologia fakliteraturo.

En la lasta ĉapitro „La pontoj“ la konversacianta duopo profiligas kiel filozofoj pri la nuntempaj problemoj de la mondo: temas pri intelektaj kaj inteligentaj konsideroj pri militoj, nukleaj armiloj, ekologio, medicino, libereco, senlaboreco, libertempo, angla lingvo, naciismo, islamo, terorismo, demokratio ktp. Sed denove: ĉu la respondoj de Zaleski al ĉiuj tiuj demandoj estas vere aŭtentikaj? Ĉiukaze ili estas, kiel ĉio cetera, verkita en senriproĉa Esperanto, bone prilaboritaj, strukturitaj kaj kompilitaj el pluraj konversaci-okazoj, kiujn Dobrzyński havis kun Zaleski ekde 1993.

Eĉ se evidentiĝas, ke Zaleski ne deziris fariĝi ia mito aŭ legendo, fine de la konversacio tamen restas la impresoj, ke li fieras pri sia nepa rolo, kiun li nun pli ĝuas ludi en sia alta aĝo ol iam ajn antaŭe. Resume: plej interesaj kaj valoraj, ĉar aŭtentikaj, do estas la unuaj du ĉapitroj pri la varsovia getto kaj la profesia kariero de Zaleski. Fakte oni ŝatus legi pli abunde pri la privata kaj profesia vivo de Zaleski, sed li preferas esti diskreta. Tial grandparto de la libro aspektas iom konstruite, almenaŭ por la esperantista leganto, kaj mi esperas, ke la libro, origine pollingve verkita, vekis despli fortan intereson ĉe la nacilingva publiko, al kiu ĝenerale mankas objektivaj informoj pri Esperanto. Ĉu tamen la esperanta versio taŭgas por laŭvorta tradukado en la germanan lingvon, ekzistas kelkaj duboj. Nome por ke la nacilingva celpubliko pli bone komprenu multajn aferojn menciitajn en tiuspecaj libroj, almenaŭ devus esti faritaj la necesaj aldonaj klarigoj en piednotoj. Zamenhof-strato, La. Roman Dobrzyński. Varpas, Kaunas 2005 (2a eld). 288 paĝoj.

Andreas Künzli

Herzliche Glückwünsche

Martin Schäffer, der Generalsekretär des Deutschen Esperanto-Bundes hat



Martin Schäffer mit seiner Frau Mallely, seiner Mutter (rechts) und der Mutter von Mallely.

am 20. März 2007 in Mérida, Yucatán, Mexiko, Mallely Martinez Mateos geheiratet. *Esperanto aktuell* gratuliert den Neuvermählten ganz herzlich.

Alfred Schubert

Mi certe parolas en ĉies nomo, se mi nome de Germana Esperanto-Asocio kore gratulas al vi kaj al via edzino. Ĉion bonan kaj la realiĝon de ĉiuj viaj deziroj por via estonto!

Rudolf Fischer

Esperanto ĉe „Nepal-Tag“

Laŭ iniciato de Lars Sözüer, la komisiito pri rondvojaĝoj de eksterlandaj prelegantoj, Barat Kumar Ghimire el Nepalo, kiu rondvojaĝis post sia partopreno de PSI tra Germanio kaj prelegis pri sia lando en multaj kluboj, partoprenis la “Nepal-Tag” de la Germana-Nepala Societo (Deutsch-Nepalische-Gesellschaft DNG) en „Gustav-Stresemann-Institut“ en Bonn.

Lin akompanis por interpreti kaj varbi por nia afero Lars Sözüer kaj Wolfgang Bohr. La triopo disdonis pli ol 100 varbilojn al la proksimume 200 partoprenantoj de tiu DNG-kongreso. Bharat,

Lars kaj Wolfgang respondis multajn demandojn pri Esperanto kaj la ĉeesto de Bharat en Germanio en la germana, angla kaj nepala lingvoj. Ankaŭ la ambasadoro de la reĝlando Nepalo, sinjoro Madan Kumar Bhattarai kaj sia edzino interesiĝis pri Esperanto kaj GEA. Ili dufoje parolis kun la triopo kaj invitis ilin al la Nepala ambasadejo en Berlino. Por la kunveno Bharat kaj Lars preparis multkoloran germanlingvan faldfolion pri “Esperanto in Nepal”, kiu trovis grandan eĥon inter la partoprenantoj. La ĉeestintaj esperantistoj estas konvinkitaj, ke GEA devas kapti similajn eventojn por persone prezen-



Dum la Nepal-Tago: La ambasadoro de Nepalo Madan Kumar Bhattarai (maldekstre) en interparolo kun Bharat Kumar Ghimire (2a de maldekstre). Dekstre la edzino de la ambasadoro.

Foto: Wolfgang Bohr

ti nian gravan laboron por internacia interkompreniĝo. GEA devas danki al la “Elisabeth-Klunder-fondaĵo”, kiu grandparte financis la vojaĝon de Bharat al Germanio.

Wolfgang Bohr

Himalaja renkontiĝo

Kutime la Internacia Himalaja renkontiĝo, al kiu la Nepala Esperanto-Asocio invitas, okazas ĉiun duan jaron, sed pro la venontjara Azia Kongreso en Bharato 2008 jam okazis post unu jaro denove, de la 26a de februaro ĝis la 11a de marto. Partoprenis 14 japanoj, 14 nepalanoj, inter ili 7 gejunuloj, unu aŭstralianino kaj 3 el Germanio. Krome 3 ĉiĉeronoj el la etnio de la Tamang popolo.

Ni montgrimpis laŭlonge de la Tamang vojoj. Tamang nomiĝas la etnio kiu vivas en la nordo, proksime al la tibeta landlimo kaj kiu iam enmigris el Tibeto al Nepalo. La Tamang popolo havas sian propran lingvon, estas budhistoj kaj iliaj kutimoj similas al la tibetaj. En tiu regiono ankoraŭ ne ekzistas hoteloj, do, ni manĝis kaj tranoktis en



Partoprenantoj de la Himalaja Renkontiĝo de Nepala Esperanto-Asocio.

la domoj de la vilaĝanoj. Estis belega sperto sidi vespere en la domoj de la vilaĝanoj, apud la fajro en la kuirejoj kaj iomete ekkoni iliajn vivmanierojn. Ni tramigris plurajn vilaĝojn, multspecajn pejzaĝojn, vizitis varmegajn fontojn. Sur la plej alta pinto ni unu tagon ĝuis belegan panoramon kaj havis eĉ iom da neĝo. Post la montgrimpado ni ĝuis sunleviĝon sur panorama pinto. Post la montgrimpado okazis programo en Katmanduo. Finfine s-ro Hori el Japanio, prezidanto de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado) kaj s-ino Franziska Toubale el Aŭstralio vojaĝis kun unu juna partoprenanto al la orienta parto de Nepalo por instrui tie dum unu semajno Esperanton al komencantoj kaj progresantoj.

Mi nun estis la 3an fojon en Nepalo kaj ĉiufoje spertis alian flankon de la lando, ĉar vivas multaj etnoj tie. Ĉiam la homoj estas ege ĝentilaj kaj gastamaj. Do, pripensu, ĉu vi ne ŝatus partopreni venontfoje. Ne nur partoprenas junaj, sportemaj esperantistoj. Kaj pripensu ke la homoj en Nepalo ne facile povas vojaĝi eksterlanden. Tial necesas, ke Esperantistoj foje vizitas la landon por motivi ilin.

*Ursula Kölsch
estu.bonvena@web.de*